
# *Maduro taksas sukcesa la duan rondon de dialogo ?us okazinta en Meksiko*




**Prezidento Nicolás Maduro**

Karakaso, sep 7 (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, priskribis kiel "sukceso" la duan rondon de dialogo inter la delegacio de sia registaro kaj la opozicio, okazinta en Meksikurbo.

Maduro, en sia konto de socia reto en Tvitero, festis la subskribon inter la partioj de du interkonsentoj pri tuja atento al la sociaj bezonoj de la venezuela popolo kaj la postulo de suvereneco super la teritorio Essequibo.

"Mi konsentas! Ni faris ?in denove en Meksiko: Ni sidigis la opozicion por paroli pri gravaj aferoj por la lando. La dialogo por Paco kaj resani?o estas sukceso por venezuelanoj ", diris la prezidento en sia tvito.

La prezidento de la sudamerika lando esprimis "nian tutan dankemon al la registaro kaj popolo de Meksiko", lando, kiu servis kiel loko por la dialoga tablo, kiu komenci?is pasintan a?guston kaj da?ris ?i-semajnfine sub la faciliga a?spicio de Norvegio.

Prezidento Maduro en serio da tvitoj publikigis komplete la Komunan Komunikon inter la Registaro de la Bolivara Respubliko de Venezuelo kaj la opozicio, subskribita ?e la dialoga tablo en Meksiko. "?i estas tago de venko por ?iuj venezuelanoj," li diris. Krome, li dividis la interkonsenton pri Ratifiko kaj Defendo de la Suvereneco de Venezuelo pri Gujana Esequibo.

"?i estas la ?eneva Interkonsento de 1966, kiun ?iuj venezuelanoj agnoskas, kiel la jura kadro valida inter nia lando kaj la Koopera Respubliko de Gujano", li klarigis.

Pri la parta interkonsento por la Socia Protekto de la Venezuela Popolo, Maduro diris, ke "?i ser?as la socian bonfarton de ?iuj kaj ?iuj, komprenante la efikojn de krimaj sankcioj sur la ekonomion kaj postulante sendependecon, suverenecon kaj memdeterminon."

Fonto: Telesur

---

[https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/269356-maduro-taksas-sukcesa-la-duan-rondon-de-dialogo-jus-okazinta-en-meksiko](https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/269356-maduro-taksas-sukcesa-la-duan-rondon-de-dialogo-jus-okazinta-en-meksiko)

**Radio Habana Cuba**